ŝi, ke tio estis efektive mirinda, sed en la momento mem, ĝi ŝajnis al ŝi tute ordinara.)

Tamen, kiam la kuniklo el sia veŝta poŝo eligis poŝhorloĝon, kaj, rigardinte ĝin, tuj plirapidis, Alicio eksaltis sur la piedojn, ĉar subite frapis ŝin la ideo, ke neniam antaŭe ŝi vidis kuniklon kiu havas veŝtpoŝon kaj poŝhorloĝon. La scivolemo en ŝi ekflamiĝis! Tuj ŝi ekkuris post ĝi trans la kampon, kaj alvenis al tuneleto sub la kreskaĵa barilo ĝustatempe por vidi la kuniklon malaperi en ĝin.

Ne konsiderinte eĉ unu momenton, kiamaniere ŝi reeliĝos, Alicio postkuris ĝin en la tuneleton.

La tunelo, ĉe la unuaj paŝoj, kondukis rekte antaŭen, same kiel fervoja tunelo, sed poste dekliniĝis malsupren kaj fariĝis kruta. Tio okazis tiel subite ke Alicio, ne havinte tempon por malakceliĝi, trovis sin vole nevole defalanta tre profundan ŝakton.

Mi ĵus diris "tre profundan." Nu, aŭ la ŝakto estis efektive tre profunda, aŭ ŝi falis tre malrapide; ĉar dum la daŭro de tiu stranga defalo, ne mankis al ŝi tempo por trankvile ĉirkaŭrigardi kaj por konjekti pri kio estas okazonta. Unue, ŝi klopodis rigardi malsupren por esplori al kio ŝi alvenas; sed klopodis vane, ĉar estis tie tro mallume. Tiam ŝi ekobservis la murojn de la ŝakto, kaj rimarkis ke ili estas plenaj de ŝrankoj kaj librobretoj; ankaŭ, tie ĉi kaj tie, ŝi



preterfalis landkartojn kaj bildojn
najloj. Poste ŝi, preterpasante, dep
breto unu fruktaĵujon ; sur ĝi per
estas skribita MARMELADO.
granda ĉagreno ; ĉar, enrigarda
okuloj vidis—nur blankan malp
volis lasi fali la fajencaĵon, pro l
per ĝi iun subulon, sed sukcesi
momentoj remeti ĝin, prete
ŝrankon.

"Nu," pensis Alicio, "kiam m
la hejmo pri ĉi tiu falego, ĉiuj
maltimon ; kaj, estonte, eĉ pri fa
ĝis malsupro de l' ŝtuparo mi r
kaj se mi falos eĉ de la tegmento
ne multe priparolos la falon." (
kredi.)

Malsupren, ankoraŭ malsupren
la falo finiĝos? "Mi volus scii"
"kiom da kilometroj mi jam fal
alproksimiĝas la ter-centron.
mi, preskaŭ ses kaj duono miloj d
(Alicio jam antaŭe lernis en l
kelkajn tiuspecajn faktojn, kaj
nuna tempo ne estis—pro mank
tantoj—oportuna por elmontri s
tamen estis por ŝi bona prakti
faktojn. "Jes, tio estas certe la ĝu
sed en kian latitudon aŭ longitudo

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN C